

Du baladoj heroaj

al Universala Kongreso de Esperanto

en Lillo, Francujo

julie 2015

**Tradukis kaj verkis
Martin Strid**

Enhavo

Du baladoj heroaj	1
Enkonduko	3
Bresta balado	7
# Melodio:	8
& Brestaj strofoj:	8
<& Notoj brestaj:	15
& Brestis kvæði:	16
Valdemara balado	21
(& Rekantaĵo:	23
(# Melodio:	23
(& Strofoj:	23
,& Unua parto. Devenoj (30):	23
,& Dua parto. Ruslandon (49):	25
,& Tria parto. Revojaĝe (45):	29
,& Kvara parto. Hungarlandon (40):	32
,& Kvina parto. Ruĝakruce (49):	35
,& Sesa parto. Militfine (37):	39
<& Notoj valdemaraj:	42

Enkonduko

*Ĉu tradicio el pratempo,
kiu travivis en angulo
periferia de Eŭropo,
povos fariĝi parto kaj eĉ
grava riĉaĵo de nova kaj
tutmonda kulturo?*

En Feroaj Insuloj oni dancas baladojn multajn, longajn, kelkajn tre malnovajn pri herooj en pratempo. Per tio la feroa lingvo vige vivas.

Dum la daŭro de la balado, homoj povas eniri la dancon kaj eliri el ĝi. Oni dancas ĉirkaŭ tri strofojn por minuto. La kanto povas efiki preskaŭ medite, kvazaŭ oni falas en trancon.

Se oni komparas la melodion kun la danco, kiu havas ses paŝojn en ĉiu turno, oni vidas ke ili ne divideblas ebene. Certa loko en la strofo – certa vorto en la rekantaĵo – neniam paŝiĝos per la sama piedo en du strofoj sinsekvaj kaj nur ĉiun sesan strofon je la sama paŝo en la danco.

Ĉar – en multaj baladoj – la nombro da taktobatoj por strofo estas 29. Tio estas primo.

Por komencanto tio povas igi la dancon pli malfacila por lerni, sed en la longa daŭro ĝi faras la dancon pli interesa por la dancantoj.

Cetere, la dancopaŝoj estas simplaj. Ili taktilabeblas tiel:

#: <Dance>

(Kv: li Li li Li De de)x

kie la rimarko <Dance> indikas taktilabojn por danco, la ilumo [Kv] signifas baladdancan prenon en ĉena ringo – vidu sube – kaj la taktilabo [li] estas unu paŝo maldekstren, [de] unu paŝo dekstren, supra tonciklo [de, li] signifas maldekstran piedon, meza tonciklo [De, Li] signifas dekstran piedon kaj la kruco × signifas ke la tuta parentezo () ripetiĝas.

[Kv] = Per via maldekstra mano tenu la dekstran polekson de la maldekstra najbaro, kun via brako sub ties brako. Per via dekstra mano tenu de supre la duan ĝis kvinan fingrojn de la dekstra najbaro. Paŝu stabile kun elasta ritmo en gamboj kaj brakoj.

En jaro 2014 kvin tutaj malnovaj feroaj baladoj tradukiĝis en esperanton. Ili en Norda Kantaro (<http://nk.tone.se/>) havas numerojn
4401."Sjúrðarkvæði.
Regin smiður = Sigurda balado. Regin forĝisto",
4405."Vilmundskvæði = Vilmunda balado",
4408."Brestis kvæði = Bresta balado",
4409."Sigmunds kvæði eldra = Sigmunda balado malnova" kaj
4414."Ormurin Langi = Drako Longa".

En la traduklaboro naskiĝis la penso krei novajn baladojn, heroajn rakontojn el la historio de la esperantomovado. Valdemara balado estas la unua tia. Legu pli je <http://nk.tone.se/Ballads2015eo.pdf> . Valdemara balado ne tute pretas ankoraŭ. Ekzemple iom pli da milita dramatikio aldonendas.

Balado povas plenumi plurajn funkciojn samtempe:

♥ Ĝi povas kontribui al agrable intensiva etoso de sociala kunesto dum kaj lokaj kaj internaciaj kunvenoj, kongresoj kaj junularaj tendaroj en Esperantujo.

♥ Ĝi povas esti bona ekzerco de la lingvo por komencantoj aŭ tiuj, kiuj malofte havas okazon paroli la lingvon en sia proksima ĉirkaŭaĵo.

♥ Trie, verece verkita nova balado povas esti bona historia instruo al parolantoj, kiuj ofte havas maltaŭgajn sciojn pri la historio de esperanto.

Kiu ajn parkerigas parton de balado, tiu povos mem konduki ĉendancon en kunveno.

Valdemara balado unuafoje prezentigis en kongreso de Sveda Esperanto-Federacio en Upsalo en majo 2015, poste en junio en muzika festivalo Elfriden, Dalekarlujo (<http://tone.se>), balada konferenco julie en Torshaveno, Ferooj (<http://ballads2015.fo>) kaj en Universala Kongreso de Esperanto en Lillo, Francujo (<http://www.lve-esperanto.org/lille2015>).

Bonan ĝuon!

Martin Strid

Borlänge, Svedujo,
julie 2015

Vizio:

*Ĉiu dua aŭ tria espo
parkerigas baladon,
longan aŭ mallongan, kaj
kapablas konduki ĝin
ĉendance. Tiuj baladaj
ĉendancoj fariĝos tipa
specialaĵo de espaj
kunvenoj ĝenerale, kio
allogas ĉiam pli da homoj
al la movado kaj fortigas
ĝian senton de kunesto kaj
kunfarado.*

Bresta balado

***Ĉu tradicio el pratepo, kiu
travivis en angulo periferia de
Eŭropo, povos fariĝi parto kaj eĉ
grava riĉaĵo de nova kaj
tutmonda kulturo?***

Brestan baladon tradukis
el la feroa Martin Strid,
martin.strid@gmail.com,
tel. +46 - 703 152 615.



Pli da nordaj baladoj kun
espaj tradukoj troveblas je
<http://tone.se/Visor%206%20Elfriden.pdf>

Melodio:

#: <Natura, 1,5:29>

(#Strofo:

/doTi re3do doTi Ti;
La3La LaaLaMi La; LaTi
doTi TiTi Ti;Ti TiTi Tire
do;

(# Rekantaĵo:

TiLa La SiLa Ti La;
LaaLaLa La3Mi So3So
Fa3Mi; MiiMiMi LaTi do
Ti La a))x60

& Brestaj strofoj:

'1 /Frue estis en maten' ;
suno ruĝas en mar' ; Bejno
domon eniris ; al Bresto,
dorma kar'.

(×:; **Paŝu gajan la dancon ;
Brilas aŭroro bele taga ;
Venu en alta somertemp'!**)

'2 "Ekstaru Bresto, mia
frato ; suno ore brilas ;
blovas neniŭ vento sur ondo
; kaj maro nun trankvilas.

.....

'3 Serĉu iron al Etan Dujmo
<> ; bordo ne ŝaŭme
blankas ; pli neniam bonis
tago ; kapti ŝafojn
mankajn."

'4 Ŝnurojn prenis kaj
rimenojn ; zone fiksis
glavojn ; malsupren al
strando iris ; postsekvis du
knaboj.

'5 Diris Sigmund Brestofilo
; li naŭ vintrojn aĝis ; "Iros
mi al Eta Dujmo ; vidi
ŝafojn sovaĝajn."

'6 Respondis Toro Bejnofilo
; dek du jarojn plenis ;
"Patro, iru vi al Dujmo ;
lasu min kunveni!"

'7 "Kion vi sur Dujmo farus
; mallarĝas grimpopadoj ;
kaj profundas rokabismoj ;
vi malaltas, knaboj."

'8 Respondis Sigmund
Brestofilo ; kreskis en
konkludo ; "Kiu kreskas ĉe
cindro ene<> ; taŭgos
malmulte ludojn<>."

'9 "Vere li diras mia filo", ;
Bresto ekis vortojn: ;"Neniu
malhelpu bravan ; menson
de junforto."

'10 Prenis boaton el densa
nesto ; maro al ili ĝemis ;
knaboj sidis en la poŭpon ;
kaj estroj ekremis.

'11 Al insulo ili eniris ;
teren tiris boaton ; kaj
antaŭen suriris monton ;
kun krutega pado.



Feroa insulo Lítla Dímun. Fotis Erik Christensen, Porkeri. Fonto: Vikipedio.

'12 Piedviglaj kaj ungfiksaj
; nenion malkuraĝas ; vikle
kuras rokfalrandon ; preni
ŝafojn sovaĝajn.

'13 Kvincent ŝafoj sur
insulo ; Eta Dujmo restis ;
nigris ĉiuj karbaturfe ;
speco konata estis.

'14 Rapidaj kiel sovaĝaj
birdoj ; en printempalveno ;
oni diras ke hvalbanoj<> ;
ĉiajn specojn prenis.

'15 Ŝajnas al mi kolerige ;
tia gregdetru' ; unuajn
ŝafojn en Ferooj ; ŝatus mi
vidi plu.

'16 Tute bone taŭgis estroj ;
sovaĝŝafojn ĉasi ; iris al
boato malsupren ; kun
kaptajo pasi.

'17 Teniso antaŭen al
Granda Dujmo <> ;
hejmatingon celis ; vidas tri
fortikajn ŝipojn ; kontraŭ ili
veli.

'18 Da kirasoj tri dekduojn ;
prue nombris ili ; glimas
lancoj, oraj kaskoj ; glavojn
suno brilis.

'19 Bresto diris vortojn tuj ;
bonis li valora ; "Bone
konas mi la velojn ; kaj
drakpruon<> oran.

'20 Aŭdu Bejno, mia frato, ;
kiel nin konsili? ; Tiuj estas
viroj kiuj nin ; volas
malutili.

'21 Unue velas Havgrimo ;
kaj Geŭta<> Trondo due ;
antaŭ ol trihora<> fino ; ni
anelos skue.

'22 Unue velas Havgrimo ;
laste velas Bjarno ; pre<> ol
sun' en maron sidas ; sangos
nian feron karno."

'23 Baldaŭ tuŝos
tajdmarfluon<> ; misas la
destin' ; Rektrokon atingos
ni ; kaj venos en Ravin'.

'24 Venos ni en pado supren
; povos ĝin defendi ; hakos
la heroojn kiuj ; volas
vundojn vendi."



'25 Al tio respondis Bejno
forta ; li bone saĝis mem ;
"Ni nin tenos ĉe insulon ;
kaj prenos duran remon.

'26 Tenu al malgolfo sekva!
; Atingeblas tero ; ne sin
laŭdos ili ke ; facilis la
konkero!"

'27 Tenis ili al insulo ; poste
militŝip' ; du videblis
konkursremi ; blankis
ŝaŭma vip'.

'28 Brakoj ruĝas, vizaĝoj
ruĝas ; forte tendenoj ŝvelas
; remiloj kurbas, remingojn
turbas ; ŝaŭmon pruo pelas.
.....

'29 Akre enŝprucis
boatrande ; okcidenta vento
; trafo sur malflusan
ŝtonon<> ; rompis
boatbendon.

'30 Sigmundo kaj Toro
junaj ; ne malfruaj ekis ;
kuris ili sur la teron ; Bresto
kaj Bejno sekvis.

'31 Iris ili al la roko ; kiuj
sciis grimpi ; supren levis
do la knabojn ; kaj metis
ilin simple.

'32 "Aŭdu, Bejno, mia
frato! ; Staros jen batalo. ;
Kelkaj Helvon<> alveturos
; antaŭ nia mortfalo!

'33 Prenu vi la sudan
flankon ; alte eblas firmi ;
staros norde mi, kaj tie ;
malfacilas ŝirmi."

'34 Havgrimo kaj kampul-
Bjarno ; rokon iras antaŭen
; Trondo kun siaj
sekvoŝtuloj ; bordon<>
vagas ĉirkaŭen.

'35 Provi volis fortaj knaboj
; rapide ataki ; fratoj akre
kaj masakre ; sangoflue
hakis.

'36 Fratoj povis glavajn
flegi ; ludon bone konis ;
ruĝigis kirasoringoj<> ;
palon al vangoj donis.

'37 Fajro fumis el glavegoj ;
ŝtalon ŝtalo klakas ; korpoj
falas kvin malsupren ; cerbo
roke flakas.

'38 Bejno hakis morten
duajn ; trian forta Bresto ;
puŝis for aliajn ĉiujn ; gojis
ne moleston.

'39 Tiam Havgrimo koleris ;
turnis sin al Trondo ; "Kial
vi malflusaŝafe ; vagu
strandon ondan?

'40 Tial al vi mi teron donis
; ke vi batalu klinge ; kial vi
lasas, kaj tuta trupo ;
glavojn pendi inge?

'41 Ruza estis Geŭta Trondo
; respondo ne mankis lin ;
"Multan vi havemas teron ;
por pelte kovri vin!

'42 Vi heroo nomu vin ;
stulta vi estas prave ; vi ne
povas per du dekduoj ; sur
du viroj venkon havi!

'43 Vi rikoltu triston,
mokon ; kaj longe ĝin
ricevos ; trupo kuris al du

viroj ; kaj fantomi devos.

.....

'44 Se vi inter viroj validu ;
kaj ne mankas em' ; iru
rokon vi unue ; kaj montru
taŭgon mem!"

'45 Koleriĝis Havgrimo ;
preter la maltimo ; kuris
kontraŭ Bresto supren ; kun
lanco en proksimo.

'46 Lanco glitis en talion ;
ŝtalo femurprofundon ;
Bresto faris finan trukon ;
sentis mortigvundon.

'47 Premis li sin sur pikon
plu ; gambo sangon lanĉis ;
hakis forte Havgrimon ;
ŝultron, brakon detranĉis.

.....

'48 Morta falas Havgrimo ;
kaj Bresto super lin ; Bejno
luktis vire lerte ; tamen falis
fine.

'49 Toron fluis larmo vange
; duriĝis Sigmund kore ;
"Ni ne ploru, ho fratul' ; sed
kaŝu bonmemore!"

'50 Tretas Trond sur
batalejo ; li vortojn bone
lasis ; "Gajnas ne en ĉiu

vintro ; en Valhal <> pli
bonas ĉasi.

'51 Sperti devas ĉi herooj ;
iri Bifrosten<> for ; morti
devos ĉiu homo ; sed ne lia
glor'.

'52 Eblas ne ke luktan ludon
; fermas fino jama ; knabojn
prenu ni por sendi ; al la
vojo sama."

'53 Svejno ingan glavon
tiras ; Bjarno diras rapide ;
"Ŝajnas min fiago hunde ;
mortigi homidojn.

'54 Devus knaboj ja ricevi ;
pacon inter viroj." ; Multaj
ŝatas Bjarnajn vortojn ; sed
Trond alion diros.

'55 "Saĝa homo
antaŭatentas ; knabojn haku
sen graco! ; Kreskos ĝis
luktuloj ili ; al ni ne ofertas
pacon."

'56 Koleriĝis Bjarno tiam ;
"Estu vi maltotem'!<> ; Ne
mortigu vi la knabojn ; ol
min prefere mem!"

'57 "Tio ne estis mia volo" ;
Trondo vortriparas ; "Mi
nur volis provi kie ; via
penso staras.

'58 Manĝon ofertos mi al ili
; kaj aliajn favorojn ; mem
edukos ilin mi ; instruos
leĝojn kaj morojn.

'59 Instruos sporton kaj
armludojn ; poemojn kaj
rakontojn." ; Ĉiuj bataleje
starantoj ; ŝatis nun ruĝan
Trondon.

'60 Estrojn ili nun honore ;
kampe enterigis ; Trondo
kun si prenas knabojn <> ;
kaj norden al Geŭto navigis.
.....

<& Notoj brestaj:

Feroa malnova dancobalado.
Tradukis Martin Strid (2014).

'3 Eta Dujmo (Lítla Dímun),
neloĝata feroa insulo krute alta.

'5 Sigmundur Brestisson
naskiĝis en jaro 0961.

'8 Ĉe cindro, ĉe fajrejo en domo.
; Ludo: aktivaĵo, vigla faro
ĝenerale.

'14 Hvalbo estas plej norda
vilaĝo de feroa Sudinsulo.

'17 Teni, direkti ŝipon. ; Granda
Dujmo, trioble pli granda insulo
norde de Eta Dujmo.

'19 Drakpruo, ornamo de
militŝipo en formo de draka
skulptaĵo.

'21 Geŭto, vilaĝo sur feroa
Orientinsulo. ; Trihora: "økt"
estas okono de tagnokto.

'22 Pre = tempe antaŭ.

'23 Kelkloke maro fluas
okcidenten aŭ orienten kaj
ĉirkaŭ ĉiun sesan horon tiu fluo
inversas direkton.

'29 Malflusa ŝtono dum malfluso
malprofundas aŭ eĉ superas
akvosurfacon.

'32 Hel estas diino de regno de
morto.

'36 Kirasoj korpaj konsistas el
kunkudritaj ferringoj.

'50 Valhalo estas la halo de dioj
kaj mortintaj herooj.

'51 Bifrost estas ĉiela vojo al
Valhalo, ankaŭ ĉielarko.

'56 Maltotemo: La originalo
havas na "vargur í ve", tio estas,
lupo en oferejo. Tio signifas iun
kiu murdis aŭ alimaniere
krimegis en sankta pacejo, ĉu
templo ĉu parlamentejo, kaj kiu
tial meritas nek respekton nek
protekton de leĝo.

'60 Trondo edukos la knabojn.
Toro restos ĉe li, sed Sigmund
plenkreska iros ĉe norvegan
reĝon Olaf Tryggvason kiu donos
al li taskon kristanigi Feroojn.
Pri tio rakontas aliaj baladoj.>

Origina teksto feroa:

& Brestis kvæði:

'1 /Árla var um morgunin, ;
sólin roðar i hav, ; Beinir gekk
i skálan inn, ; sum Brestir
sterki svav.

(x:: Treðum lættliga dansin! ;
Dagurin skín so fagurliga, ;
komið er hægst á summarið.)

'2 "Statt upp Brestir, bróðir
mín! ; sól i skorar gyllir, ;
eingin blæsur vindur á vág, ;
og sjógvurin er stillur.

'3 Lít tær út at Lítlu Dímun, ;
har hvítir ei við tanga, ; aldri
fæst ein betri dagur ;
bjargaseyð at fanga."

'4 Tóku bond og bjargalinur, ;
gyrdu svørð við belti, ; gingu
so til strandar oman, ;
dreingir tveir teir eltu.

'5 Mælti tað Sigmundur
Brestisson, ; vetrar var hann
níggu: ; "Eg skal út á Lítlu
Dímun ; hin villa veðr at
siggja."

'6 Svaraði Tórir Beinsson, ; á
tólvtá ári var: ; "Faðir, fert tú
á Dímun út, ; lat meg fylgja
tær!"

'7 "Hvat skulu tit á Dímun
gera, ; har eru stíggir trongir,
; langir eru teir loftskútar, ;
og lágir eru tit dreingir".

'8 Svaraði Sigmundur
Brestisson, ; snimma vaks hans
hugur: ; Hann, ið alist við øsku
inni, ; lítið í leikum dugir!"

'9 Satt hann sigur, sonur mín,"
; Brestir tók til orða, ; "eingin
skal hjá ungum alva ;
bragdarhugin forða."

'10 Tóku bát úr tøttum neysti,
; rangt var teimum sjógvað, ;
dreingir settust i rengur niður
; og høvdingar at rógva.

'11 Løgdu teir at oynni inn, ;
bátin upp teir drógu, ; gingu so
í bergið fram, ; sum brattar
rásir lógu.

'12 Fótafimir og klófastir, ;
óttaðust ei nakað, ; lupu lætt
um leysar upsir ; styggan seyð
at taka.

'13 Fimm hundrað av áseyði ;
Lítla Dímun bar, ; svart var alt
sum kolamógvur, ; eyðkent
slag tað var.

'14 Stygt og kvikt sum villur
fuglur, ; vartreyst út av lagi. ;
So er sagt, at hvalbingar, ;
teir tóku av alt slagið.

'15 Tykir mær tað harmiligt ;
at fara so um fæ; fyrnsta
seyð, i Føroyum var, ; meg
lysti enn at sæð.

'16 Fullvæl dugdu
høvdingarnir ; vargaseyð at
veiða, ; gingu so at báti oman, ;
fongin við sær leiða.

'17 Hildu fram at Stóru
Dímun, ; vildu vinna heim, ;
siggja trinnar miklar skútur ;
sigla mótur teim.

'18 Albrynjaðar triggjar
tylvtir ; taldu teir á færum;
glitra spjót og gyltir hjálmar,
; sólin skein á svørðum.

'19 Brestir mælin orðum hátt,
; gott var í honum evni ;
"Fullvæl kenni eg seglini ; og
gylta drekastevnið.

'20 Hoyr tú Beinir, bróðir mín!
; hvat ráð skulu vit taka? ;
Hasir eru garpar teir, ; ið
okkum ætla at saka.

'21 Fyrstur siglir Havgrimur, ;
og siðan Gøtu-Tróndur; áðrenn
økt at enda er, ; elvist leikur
óndur.

'22 Fyrstur siglir Havgrimur, ;
og siðstur siglir Bjarni; áðrenn
sól i havið setur, ; blódgast
okkurt jarnið.

'23 Skjótt so ber teir
sjóvarfallið, ; lagnan gerst so
skeiv ; náddu vit at Rakhellu ;
og komu upp i Kleiv.

'24 Komu vit i stíggin upp, ; vit
kundu hann væl verja, ; høgdu
niður hetjur tær, ; ið tordu á
at herja."

'25 Svaraði hartil Beinir
sterki, ; i royndum var hann
góður: ; "Vit skulu halda at
oynni inn ; og taka ein harðan
róður.

'26 Haldum fram mót næsta
nesi! ; Kunnu vit landi ná, ; ikki
skulu teir rósa av, ; teir
lættan sigur fá!"

'27 Hildu teir mót oynni inn, ;
herskip aftaná; sóust rógva
kappar tveir, ; so hvíta mjöll
dreiv frá.

'28 Armar rodna, andlit
rodna, ; spennast sterkar
spengur, ; árar bogna, homlur
togna, ; skúmið dreiv um
rengur.

'29 Rokið stóð um æsing inn ;
sum vestanveður hvast, ;
rendu so at fjørusteini, ; at
barkabandið brast.

'30 Sigmundur og Tórir ungi ;
vóru ikki seinir, ; lupu teir á
landið upp, ; Brestir og so
Beinir.

'31 Hildu teir at hellu fram, ;
sum hamarsklettur var, ; lyftu
upp so dreingirnar ; og settu
niður har.

'32 "Hoyr tú Beinir, bróðir
mín! ; her skal striðið standa, ;
onkur skal til heljar fara, ;
áðrenn vit hava andað!

'33 Tú skalt taka suðursíðu, ;
høgt er har at herja; eg skal
standa nordanvið, ; har verri
er at verja."

'34 Havgrímur og Bjarni bóndi
; fram mót hamri fara, ;
Tróndur við sínum
fylgisveinum ; reikar runt í
tara.

'35 Roynast vildu treystir
dreingir, ; skjótt teir atsókn
veita, ; brødur høgga fast og
hvast, ; teir renna flógvan
sveita.

'36 Brødur kundu brandar
beita, ; kendu væl teir leikir;
reydir giørdust brynjuringar, ;
kjálkar giørdust bleikir.

'37 Eldur reyk úr
eggjateinum, ; stál mót stáli
smellir, ; fimm so fullu
kroppar niður, ; heilin stökk
um hellur.

'38 Beinir tveir til heljar hjó,
; og triggjar Brestir sterki;
ota undan allir aðrir, ; gleðast
ei við verkið.

'39 Reiður var tó Havgrímur, ;
hann sær mót Tróndi vendir: ;
"Hvi manst tú sum
fjøruseyður ; reika runt um
strendur!

'40 Til tess gav eg tær ognir minar, ; tú skuldi í víggið ganga; hví letur tú og alt títt lið ; svørð í slíðrum hanga?"

'41 Vitugur var Gøtu-Tróndur, ; ikki treyt honum svar: ; "Mikið vilt tú manntal hava ; til skotbjálva hjá tær.

'42 Kappa manst tú kalla teg, ; dólgur ert tú av sonnum, ; kanst tú ikki við tógva tylvtum ; vinna á tveimum monnum!

'43 Heysta manst tú harm og háð, ; tað spyrst um leið so langa, ; liðið leyp á tógva menn ; og mátti aftur ganga.

'44 Vilt tú millum manna metast, ; og bilar tær ei hugur, ; fyrstur gakk á klettin upp ; og vís so, hvat tú dugir!"

'45 Argur gjørdist Havgrímur, ; ilskan vóks um mótið, ; rendi hann móti Bresti upp ; og legði til við spjóti.

'46 Spjótið gleið í miðju inn, ; stál í indrum lendi; Brestir gjørdi eitt avreksbragd, ; hann banasár sær kendi.

'47 Trysti hann seg á stungu fram, ; blóð úr beni oysti, ; høgdi so til Havgrím sterka, ; øksl og arm hann loysti.

'48 Deyður dettur Havgrímur ; og Brestir omaná. ; Beinir berjast menniliga, ; tó hann falla má.

'49 Tóri runnu tár á kinn, ; harðnar Sigmunds sinni: ; "Grátum ikki frændi mín, ; vær goymum væl í minni!"

'50 Tróndur trínur á válin fram ; væl kundi hann orðum greiða: ; "Ikki vinst á hvørjum vetri ; i Valhøll betri veiða.

'51 Hoyrast mugu hetjur hesar ; hart um Bifrøst fara; doyggja má hvør menskur maður, ; tó ei mansins æra.

'52 Ei man vera hildarleikur ; lokin enn at enda ; taka skulum vær dreingirnar ; og sama veg teir senda!"

'53 Sveinur svørð úr slíðrum dregur; Bjarni fram sær skundar: ; "Tykir mær so vánt eitt verk ; at drepa børn sum hundar.

'54 Njóta skulu dreingirnir ;
grið imillum manna." ; Mongum
líkar Bjarna orð, ; men
Tróndur mælir annað.

'55 "Vísur maður er
fyrirvarin; - høggið tit
dreingirnar niður! ; Vaksa teir
upp til valamenn, ; so býðst
okkum eingin friður."

'56 Ilskur gjørdist Bjarni tá: ;
"Verði tú vargur í ve! ; Ikki
skulu tit dreingirnar drepa ;
heldur enn sjálfan meg!"

'57 "Ikki var hatta vilji mín," ;
Tróndur orðum vendir, ; "bara
vildi eg royndir freista, ;
hvørt tykkara hugur stendur.
.....

'58 Bjóða skal eg teim kostir
teir, ; ið væl mugu eitast
góðir, ; sjáður vil eg teir
fostra upp ; og læra teir sið
og lógir.

'59 Kenna teim ítrótt og
vápnaeikir, ; skaldamál og
søgu. ; øllum teim a válinum
stóðu ; líkti nú Tróndar røðu.
.....

'60 Heiðurliga teir
høvdingarnar ; jarða undir
fløtu. ; Tróndur tók so
dreingirnar ; og førði norð í
Gøtu.



Valdemara balado

Valdemaran baladon laŭ
feroa modelo verkas kaj
komponis Martin Strid,
martin.strid@gmail.com,
tel. +46 - 703 152 615.

La fotoj de Valdemar
Langlet titolpaĝa estas de
jaroj 1906 kaj dorsoflanka
de iam antaŭ 1944.

Ĉi dokumento rete ĉerpeblas je

<http://nk.tone.se/> aŭ

<http://eo.tone.se/Du%20baladoj%20heroaj.pdf>



(& Rekantaĵo:

; Kantu forte ; frape paŝu
dancon kaj ridetu ; belas
nova tag' ; kantu forte.)

(# Melodio:

<Natura, 1,5:29>

(#Strofo:

/lala sofa fami mifa; sola
laso fami; lala sofa remi
fala; sofa fami mire;

(# Rekantaĵo:

mifa so so; la3la lala lala
lala so so; dodo dore mi;
mifa so so)

+

(# Ebla dua voĉo:

dore mi mi; fa3mi redo Tido
remi La La ; lala sofa mi;
dore mi mi))x250

(& Strofoj:

,& Unua parto. Devenoj
(30):

'1 /Venu jam kunigi nin ; en
ĉendancon feroan ; ĉar ni
historion konu ; kaj fieru
heroan. (×: &Rekantaĵo)

'2 Nun aŭskultu jen baladon
; belan mi rakontos ; pri
sinjoro kuraĝa kiu ; duran
devon frontos.

'3 En Francujo hugenotojn ;
reĝo persekutis. ; Fuĝis
Langleoj de l' despoto ; kaj
ekzilon salutis.

'4 En Svedujo poste loĝis ;
bona arĥitekto ; ĉar lia
prapatro fuĝis ; tien
vivprotektan.

'5 Verkis fabelojn por
infanoj ; kaj instruajn
librojn ; Matilda Soederen'
fraŭlino ; voĉis amajn
vibroj.

'6 "En Sudermanlando vivas
; arĥitekto sperta. ; Estrajn
domojn kaj preĝejojn ; li
konstruis lerta.

'7 Por norvega parlamento ;
Emil desegnis domon. ; Plu
famigis teatrejo ; Dramen
lian nomon."

'8 "Svaton jesu, edziniĝu ;
al sinjoro Langleo ; ne pro
riĉo kaj prestiĝo ; sed
familia kreo."

'9 Spetebihale post la nupto
; hejmon faris ili ; vivis
honeste sen korupto ; kvar
ŝi naskis filojn.

'10 Frato Filip inĝeniero ;
kun Nobel' laboris ; poste
pri konstruteĥniko ;
Stokholme profesoris.

'11 Frato Abrahamo ĥemion
; diligente studis. ;
Profesoro heliuman ; pezon
li konkludis.

'12 Frato Aleksandro artisto
; rajdi ĉevalon ŝatis ; pentris
mondon de ekzisto ; povas
mi konstati.

'13 Valdemar' plej juna filo
; de Emil kaj Matilda ;
kreskis intelekto brila ; en
homamo milda.

'14 En Polujo judo juna ;
kreis novan lingvon. ;
Varsovie li eldonis ; per
doto tiun atingon.

'15 Libron cenzuristo
rigardis; en tempo de
siringoj ; en la rusa, pola,
germana ; franca kaj angla
lingvoj.

'16 Unuan libron li al homoj
; diverslanden sendis ; kaj
reagojn de ranguloj ; kun
espero atendis.

'17 Dekkvinjara Antonina ;
Esperanton lernis ; ĉar ne
volis venkon finan ; atendi
ĝis eterne.

'18 Skribis ŝi leteron kaj ; al
Zamenhofo sendis. ; Lin
kortuŝis vortoj ŝiaj. ; Bone
respondendis.

'19 "En Simferopolo
instruas ; mi ĝin al
kamaradoj. ; Pensoj
homaranaj influas ; dum la
lingva studado.

'20 Ni nun esperanton kune
; ku2n ĝojo lernas. ; Volas
generacio juna ; vivi
mondon modernan."

'21 Venis vortoj de la majstro ; ankaŭ al Upsalo. ; Otto ordiniĝis pastro ; en la katedralo.

'22 "Valdemaro, ho studanto ; de l' universitato ; lingvon rigardu Esperanton ; certe vi ĝin ekŝatos."

'23 Valdemar' kaj Otto Zejdlico ; studis la novan lingvon. ; Ĉiu poste en sia ofico ; bone sin distingos.

'24 Ili societon faris ; por lingvo Esperanto. ; elektiĝis Valdemaro ĝia prezidanto.

'25 Ludoviko pensas pri ; homara paca pado: ; "Ĉu la lingvo Esperanto ; fariĝos monda movado?"

'26 Mondolingvo Volapuko ; perdas da prestiĝo. ; Nurenberga klubo decidis ; esperantistiĝi.

'27 Volapukon trafis jam ; forlaso kaj disfalo. ; Klubon esperantan fondis ; junuloj en Upsalo.

'28 Dua klubo kaj unua ; por nur Esperanto, ; estu lumo por movado ; monde malgiganta."

'29 "Kara mia edzo, vi ; ne estu maltrankvila. ; Vian lingvon lernas jam ; anaro tuj multmila."

'30 De Valdemara balado nun ; jen parton la unuan ; finas ni sed dancos kune ; baldaŭ la parton duan.

,& Dua parto. Ruslandon (49):

'31 Jen Valdemaran parton duan ; kantos mi al vi tu2j. ; Valdemaro renkontis fruajn ; espojn en Rusu2j'.

'32 "Esperantistoj al Jalto venu!" ; anoncis Ilja Ostrovski. ; Pra-Pasportan Servon jenan ; devas mi agnoski.

'33 "En La Esperantisto amikojn ; lingvajn iu invitis" ; diris Valdemar' al Eriko ; "iru ni viziti.

'34 Kun kamaradoj mi jam
fondis ; esperantoklubon. ;
Tempas pri uzeblo respondi
; kaj forigi dubon.

'35 Planu ni vojaĝon kune ;
trans la maro balta ; ek de
Sankta Peterburgo ; ĝis la
urbo Jalta."

'36 "Rusoj al Svedujo estas
; hereda malamiko" ; diris
Eriko, "Ĉu atesti ; tion en
praktiko?"

'37 "Malamikojn ĉu vi diru ;
(tamen estas homaro)?(sed
jen amikaro). ; Tra Rusujo
ambaŭ iru ; ni al Nigra
Maro."

'38 Iris ek sur longa vojaĝo
; du studantoj svedaj ; pro
krimea espa mesaĝo ;
amikecon kreda.

'39 Tra Finnlando li biciklis
; Sanktan Peterburgon. ;
Esperanta parolo tiklis ; kun
espo en tiu urbo.

'40 Esperanton Erik ne sciis
; eke ne parolis. ; Dum
veturo lernis li ; ĉar
komuniki volis.

'41 Ili veturis per fervojo ;
Moskvon en rapido ; gastis
faman Lev Tolstojon ; kun
loka espa gvido.

'42 Militon kaj pacon
diskutis ; kaj cenzuron
baran. ; "La Regno de Dio
estas ene ; de vi, miaj karaj.
.....

'43 Donu preter egoismo ;
spacon al la amo ; kiel
fortojn adicias ;
paralelogramo."

'44 Valdemar' dankemas
ĝoja ; pro la granda saĝo ;
kiun dividis jen Tolstojo ;
kaj kontente mesaĝas.

'45 "En Rusujo kun amikoj ;
ni spertas unuan fojon ;
internacian lingvaplakon ;
poste daŭrigos vojon.

'46 Al Krimeo suna hastos ;
ni trans montan alton ; ĉe
Ilja Ostrovski gastos ;
maran urbon Jalton."

'47 Antoninan Ilja vokis ;
"Venu al gastoj montri ; la
plej belajn krimeajn lokojn ;
kaj al ili rakonti."

'48 En Krimeo kunestadon;
ĝuas tri semajnojn. ; Ĝis
daŭrigas ili padon ;
lingvofluon gajnos.

'49 De Sevastopolo ŝipiras
; ili konatan adreson ; de
esperanta pioniro ; Borovko
en Odjeso.

'50 Estis Nikolao la sama ;
kiu el Varsovio ; ricevis la
respondon faman ; pri
Esperanthistorio.

'51 Li kaj Antonina jam
gvidis ; internacian
voĉdonon ; kiun Odjesa
klubo decidis ; pri
reformpropono.

'52 Dankis pro tio
Zamenhof' ; ke ili grave
agis ; lin, estontan teozofon
; kaj ŝin, kiu ĉion pagis.

'53 Ĉiĉeronis Antonina ; kaj
sen ajna dubo ; bone
reprezentis sian ;
esperantoklubon.

'54 "Valdemar", mi vidas ke
; vi ja ne estas danda. ;
Eltriviĝis viaj ŝuoj ; pro
paŝado planda."

'55 "Kun vi kara Antonina;
urbon ni promenis. ; Multon
interesan vidis ; ne piedojn
trenis."

'56 Nikolaon Bo2rovkon;
edziniĝis poste ; Antonina
Ĉaikovska. ; Nupton ĝoje
tostu!

'57 En Odjeso Valdemaro ;
kun Vladimir Gerneto ;
akordiĝis pri refaro ; de
monata gazeto.

'58 "Ĉesis jam La
Esperantisto ; ĉar mono
mankas. ; Da abonantoj
longa listo ; novan eldonon
dankus.

'59 Ĝi de Tolstoj publikigis
; verkon Prudento kaj kredo
; kio cenzuron rusan instigis
; ordoni ke ĝi cedu.

'60 La cenzuro esperanton ;
eldoni malpermesis ; sed
revuon en bona kvanto ;
svedoj povus presi.

'61 Gazeton Lingvo
Internacia ; parte mi
financos. ; Preso estu tasko
via ; jen nia alianco.

'62 Per leteroj mi redaktos ;
esperantogazeton. ;
Eldonadon vi pritraktu ; ĝis
dissendo pretos."

'63 "Gazeton Lingvo
Internacia ; presos mi kaj
eldonos" ; diris Valdemar',
"kaj mi ; amikojn helpajn
konas.

'64 Tiel glate ni evitos ;
caran la cenzuron ; kaj
forumon faros meritan ; por
la nova kulturo."

'65 Ŝipon ili al Istanbulo ;
serĉis el Odjeso ; sed
ŝipestrojn ebriulojn ; volis
tuj forgesi.

'66 Erik al maristo parolas ;
"Serĉas ni ŝipon ; iri
Konstantinopolon. ; Ĉu per
via skipo?"

'67 "Nia ŝipestro kuŝas
plankon ; eĉ ne povas stari.
; Brando ne estas lia
manko" ; maristo fideklaris.
.....

'68 Venis per rusa
vaporŝipo ;
Konstantinopolon. ; Ĉe
Bosporo brilis urbaj ; turoj
sur markolon.

'69 Aĥmed Paŝa ilin gastigis
; ridis rondaventra. ; Grand-
sinjoro de l' kortego ;
montris kion li pentras.

'70 "Restu pli longe en
Hungarujo!" ; Valdemaro
proponis ; "Ne, ni hejmen
iru tuje!" ; Erik lin admonis.
.....

'71 "Budapeŝto min ravas
plu!" ; Valdemaro vokis. ;
"Via monujo havas truon!" ;
lin Eriko mokis.

'72 El Upsalo venas gazeto ;
Lingvo Internacia. ; En la
tuta mondo aperas ; neniu
alia.

'73 Sur sin tiun taskon
prenis ; Valdemar' Langle' ;
doktoro Krikorc, Pol Nilen'
; kaj Alberj por ekspedo.
.....

'74 Kvar klubanoj fondis
ĝin ; kaj poste ili produktis ;
dum kvar jaroj magazinon ;
kiu lingve fruktis.

'75 Gazeton redaktas
Vladimiro ; de distanco
granda. ; Poŝti ĝin klubanoj
iras ; por homoj
diverslandaj.

'76 Nikolao trovis lokon ;
en Sankta Peterburgo. ;
Translokiĝis paro Borovko ;
de lando de la sturgo.

'77 Al ili la revuon ; poŝto
pakaĝe liveris. ; La Rusujan
distribuon ; ili letere peris.
.....

'78 Valdemaro pionira ;
estas esperantisto ; kaj per
spertoj li fariĝos ; bona
ĵurnalisto.

'79 Valdemaran baladon ni
jam ; finas parton duan ; kaj
ni ĝian parton trian ; baldaŭ
dancos bruan.

***& Tria parto. Revojaĝe
(45):***

'80 Nun de Valdemara
balado ; kantos mi parton
trian ; pri lia vojaĝado ; en
mondo nia.

'81 Al Rusujo duan?rean
fojon ; Valdemar' sopiras. ;
Sanktan Peterburgan vojon
; li somere iras.

'82 Bonvenigis geborovkoj.
; En ŝia utero ; jam embriis
Valdemara ; venonta
amespero.

'83 Ĝojis Antonina kara ;
kaj en ŝia sino ; kreskis jam
por Valdemar' ; estonta dua
edzino.

'84 "Aleksandro, frato mia ;
vi ĉi tie restis. ; Ĉu Nobela
ekspozicio ; tre sukcesa
estis?"

'85 "Jes, mi la ornamojn
faris ; pagon ricevis tu2j. ;
Antonina la monon ŝparis ;
ni iru al Italu2j'."

'86 Post Rusujo Budapeŝten
; venis Valdemaro ; vidi
grandan ekspozicion ; de
hungara miljaro.

'87 Li en Lingvo Internacia
; skribas artikolojn ; espe
pri vojaĝoj siaj ; kaj amikaj
paroloj.

'88 Al Rusujo trian fojon ;
Valdemar' sopiras. ;
Sanktan Peterburgan vojon
; li somere iras.

'89 Por li stampis la sveda
konsulo ; rekomendan
leteron. ; "Al ĉi tiu bona
junulo ; fidu en aferoj."

'90 Li veturis per fervojo ;
inter kamparanoj ; viziti
grafon Lev Tolstojon ; en
Jasnaja Poljana.

'91 Devis ŝanĝi vagonaron ;
li en urbo Tula ; ĉe preĝejo
renkontis paron ; povran
ĉifonulan.

'92 Lev lin bonvenigis kore
; en sia vilaĝo ; kaj dividis
kaj palacon ; kaj profundan
saĝon.

'93 Demandis li de Lev
moralon ; post malvenko
ŝaka: ; "Kiel ĝuste agi sen
falo ; en malĥristan vakon?
.....

'94 Mizerulan paron
renkontis ; mi ĉe preĝejo
dorman. ; Riĉa mi junulo
hontis ; pri almozo norma."
.....

'95 Lev respondis kun
okuloj ; fajrobrile viglaj ;
"Ni ne kapablas vivi
sanktule ; tio vivon siglas."
.....

'96 Sergej Aleksandroviĉ' ;
tatara ĥana pranepo ; helpon
al Valdemar' dediĉis ; sur
kozaka stepo.

'97 Juĝisto Dmitri Ivaniĉ' ;
kaj vilaĝa atamano ; trovis
por li taŭgajn kondiĉojn ; ĉe
Filonovskajanoj.

'98 Kun kozakoj vivi li
volis ; en maleleganto. ;
Kun Sergej' kaj Dmitri
parolis ; nur en esperanto.
.....

'99 Pluge, rikolte, draŝe
laboris ; li ĉe kozakoj pene.
; Supon kaj nigran panon
voris ; vekiĝis frumatene.
.....

'100 Rusan stepon sur
ĉevalo ; Valdemar' vojaĝos
; post restado radikala ; en
kozaka vilaĝo.

'101 Sur ĉevalo Zakaulok ;
rajdis li horizonten. ; Rusan
kamparanan gastamon ; ĉie
li renkontis.

'102 Sur Zakaulok rajdis al
nordo ; li dum sunis kaj
blovis ; kaj ĉe ĉiu kampula
pordo ; koran gastamon
trovis.

'103 Kampulojn, amikojn
kaj princinojn ; gastis li sur
vojo. ; Post riveroj kaj
ravinoj ; revenis al Tolstojo.
.....

'104 "En mia dudekkvina
jaro" ; diris Valdemaro ;
"rajdis mi kozakan ĉevalon
; ĝis Balta Maro.

'105 Mi dum iro spertis
pravon ; ke stampita letero ;
al ŝtatano pruvas gravon ;
de bezona afero."

'106 Jarcentfinon esperanta
; unua edziĝo vestas. ;
Signe Blumberj el
Akvelando ; kaj Valdemaro
festas.

'107 "Mielmonate ni vojaĝu
; foran Samarkandon. ;
Rusa registaro omaĝon ;
donos tra la lando.

'108 Pro letero de reĝo
Oskaro ; nia grupo disponos
; tra imperio de rusa caro ;
mem fervojvagonon.

'109 Vi nin sekvu en vojaĝo
; frato Aleksandro. ; Bildojn
pentru de vilaĝoj ; kaj
riveraj meandroj."

'110 Signe al li naskis filojn
; bele sane kreskis ; juna
Lars kaj aĝa Emilo ; bone
adoleskis.

'111 En la granda imperio ;
de la rusa caro ; fermentiĝas
revolucio ; en la laboristaro.
.....

'112 Valdemaro ĝin atestis ;
en aparta libro ; kiel
popolon trupoj molestis ;
murde per kalibroj.

'113 "Se maltaŭga registaro
; civitanojn murdas ; al iliaj
pledaj deklaroj ; oni restu
surda."

'114 Fondon de sveda
esperanto;federacio gvidis ;
Valdemaro kaj sen vanto ;
poste ĝin prezidis.

'115 Verkis Valdemaro pri ;
milito en Balkano. ; Por la
monda katastrofo ; estis ĝi
la ĉano.

'116 En la mondmilito logis
; Finnlandon liberiĝi. ; Ilin
Valdemar' apogis ;
kampanjis li prestiĝe.

'117 Dum la rusa revolucio
; al finnoj libero venis. ;
Valdemaro helpis tion ; kaj
ricevis ordenon.

'118 Trian jaron de la paco ;
mortis lia Signe. ; Vivo
estas nur donaco. ; Enteriĝis
digne.

'119 Valdemaro al Rusujo ;
ĵurnaliste iras. ; Antoninan
li renkontas ; ŝi problemojn
diras.

'120 "Kara mia Nikolao ;
patro ilia mortis ; kiu al ni
vivsekuron ; kaj monon
hejmen portis.

'121 Ĉu vi povas al Svedujo
; mian filinon preni ; ke mi
povu la aliajn ; sola en vivo
teni?"

'122 "Nina venu al
Stokholmo ; plu muzikon
studi. ; Ĉe mi", diris
Valdemaro ; "povos pianon
ludi."

'123 Enamiĝis Valdemaro ;
kaj la juna Nina. ; Ŝi fariĝis
post du jaroj ; lia
novedzino.

'124 Mi la trian parton nun ;
rakontis Valdemaran ; kaj
ni poste dancos kune ;
ankaŭ la parton kvaran.

,& Kvara parto.

Hungarlandon (41):

'125 Nun mi kantos kvaran
parton ; pri Valdemar' kaj
Nina. ; Mondo tre malbone
fartos ; pro malamo
kulmina.

'126 Lernis Esperanton
frue; Valdemar' kaj regis. ;
Li dek unu lingvojn flue ;
kaj parolis kaj legis.

'127 Germanujon humiligis
; la venkintoj militaj ; kio
kontraŭreagon instigis ;
civilizon spitan.

'128 Eĉ pli Hungarujon
rabis ; paco Trianona. ;
Restis por miljara nabo ;
lando nur triona.

'129 En sia kvindeknaŭa
jaro ; rajdis Valdemaro ;
puston longe sur ĉevalo ; tra
lando de hungaroj.

'130 Rajdis Valdemar'
ĉevalon ; tra hungara lando
; por ekkoni ĝin pli bone ;
ol de fervojrando.

'131 Ekinstruis li svedan
lingvon ; en universitato ;
kaj studantojn judajn ŝirmis
kontraŭ rasismaj batoj.

'132 Li en Budapeŝto
laboras ; en lingva fakultato
; kaj rimarkas ĉe ĥristanoj ;
mankon de kompatato.

'133 Post verkado,
tradukado ; kaj kontakta
kreo ; fariĝis li de l'
ambasado ; kultura ataŝeo.
.....

'134 Adolf Hitler sen
skrupuloj ; homojn tre
malamas. ; Kontraŭ judoj,
maldekstruloj ; amasparoloj
flamas:

'135 "Judoj kaj ciganoj
estas ; senvaloraj rasoj. ; El
ili neniu restu ; pace ni ne
lasu.

'136 Al ni arjoj ankaŭ slava
; raso malsuperas. ; Jes, la
onidiroj pravas ; ili ne
prosperos."

'137 Nazia partio sen
kompatato ; homojn
malestimas. ; Judoj, slavo,
demokratoj ; regon ilian
timas.

'138 Pli da teritorio postulas
; nazia retoriko. ; Libro
brulas, kapoj rulas ; antaŭ la
svastiko.

'139 Plojn Germanujo
atakas ; grakas generaloj. ;
Dua mondmilito diskrakas ;
landojn al bataloj.

'140 "Diplomatoj sovetaj
foriru!" ; Hungarujo
postulas. ; Valdemar'
 eskortis ilin ; sekure ĝis
Istanbulo.

'141 Hungarujo sendas
trupojn ; lukti kontraŭ rusoj
; por eviti germanan okupon
; kiel aŭstroj ĵuse.

'142 Stalingradon germanoj
tuŝas ; en batalo decida. ;
Ilin de tie rusoj repuŝas ;
okcidenten rapide.

'143 Martan tagon la nazioj
; faras hungare puĉon. ;
Valdemaro vidas defion ;
"Komenciĝos buĉo."

'144 Valdemaro kaj Per Anger ; en ambasado sveda ; antaŭvidis regi sange ; nazia murdobsedo.

'145 "Adolf Ajhmann el Germanujo ; venis forigon gvidi. ; Judojn li kolektas tuje ; sendos al perfido.

'146 Judojn for nazioj portas ; en tro malgranda spaco. ; En vagonoj centoj mortas ; pro premiĝo kaj laco.

'147 Mi ne mem atestis tion ; sed aliaj vidis ; kaj al ni rakontis ĉion. ; Dume neniu ridis.

'148 Malantaŭ ŝlositaj klinkoj ; en kunpremo merda ; plurajn tagojn eĉ sen trinko ; multaj prudenton perdas.

'149 Ĉu ni povas helpi homojn ; resti en sekuro ; kaŝi sin en ŝirmaj domoj ; for de sanga spuro?"

'150 "Mi pasporton doni povas ; se iu rilaton ; por si al Svedujo trovas ; ankaŭ nur privatan."

'151 Al Per Anger Valdemaro ; respondas per informo. ; "Necesas nun vivsava faro ; ekster kutima normo.

'152 Karlo Luc en ambasado ; svisa simile faras. ; Registaron li persvadis. ; Kartoj arestojn baras.

'153 Kaŝas li homojn de arestoj ; en eksa fabriko vitra ; ŝirmas ilin de molestoj ; kaj mortigoj arbitraj.

'154 Kaj mi tiel same faros ; kvankam kontraŭ juro. ; Homojn kaŝi ni preparos ; inter amikaj muroj."

'155 Diris Per aserton pravan ; "Helpu, jes, per domoj ; rajton vivi ĉiuj havas; homoj estas homoj."

'156 "Homoj estas homoj, ĉiuj ; havu rajton vivi" ; diris Per, "Vi helpu al tiuj ; provu ni intensive.

'157 Sagokrucanoj homojn
ĝenas ; akre kaj minace. ;
Valdemar' kaj Nina penas ;
aŭdace kaj senlace.

'158 Valdemar' maljuna
bravas ; kontraŭ ili kuraĝi. ;
"Ili ne igu mortigejen ;
homojn alvojaĝi."

'159 En sia sepdekdua jaro ;
en ombro de milito ; taskon
sur sin Valdemaro ; prenas
teruron spiti.

'160 Valdemar' kaj Nina
Langleo ; kaŝas multajn
homojn ; ĉe amikoj
malobee ; en privataj
domoj.

'161 Helpas homoj al la
paro ; en la savaj agoj. ;
Multaj homoj ordinaraj ;
laboras ja sen pago.

'162 Kelkajn kaŝas ĉe
monaĥojn ; kelkajn en
lernejoj. ; Ilin flegas kaj
prizorgas ; kiom eblas pleje.
.....

'163 Savoreta transporta
servo ; havas eĉ ŝargauĝon ;
kaj kampare
manĝaĵrezervon ; ne
priparolu laŭte.

'164 Per hungara amikaro ;
judojn save kaŝas ; ili kaj
ĉion eblan faras. ; Morto
strate paŝas."

'165 Nun de balado
Valdemara ; kaj pri brava
Nina ; finas ni la parton
kvaran ; kaj tuj dancos
kvinan.

*, & Kvina parto. Ruĝakruce
(49):*

'166 Finis ni la parton
kvaran ; kaj nun ekas
kvinan. ; Alparolis
Valdemaron ; lia edzino
Nina.

'167 "Grafo Folke Bernadot'
novas ; en Ruĝakruca
estraro. ; Ĉu ni lin interesi
povas ; veni ĉe hungarojn?"
.....

'168 "Kara Nina, bona ideo"
; Valdemar' respondis ; " li
estos brila korifeo ; Ruĝan
Krucon fondi."

'169 Eksterlandan
ministerion ; Valdemar'
entretis ; ĝeneralan
sekretarion ; li renkonti
petis.

'170 "Graŝon akceptu Bernadoton. ; Helplaboro gravas ; Ruĝa Kruco Sveda fondota ; urĝe homojn savos."

'171 "Ne ricevus li permeson ; tra Germanujo veni ; sed mi pensas ke sukcesos ; vi la gvidon preni."

'172 "Ruĝan Krucon ankaŭ ĉu mi ; devas reprezenti ; por al homoj helpi dume ; en militaj turmentoj?

'173 Ruĝan Krucon certe mi do ; devos organizi ; por al homoj kun rapido ; doni vivprovizojn."

'174 Sur maljunajn ŝultrojn prenas ; Valdemar' la gvidon. ; Tio sagokrucanojn ĝenas. ; Planas ili perfidon.

'175 Sagokruco kaŝejoj serĉas ; por fuĝantojn trovi. ; Kaptatoj multajn larmojn verŝas ; ĉar sin kaŝi ne povis.

'176 "Homojn la nazioj kaptas ; estas granda krizo. ; Kara Nina, ni adaptu ; nian organizon.

'177 Ĉi leterojn ni eldonu ; kvazaŭ fotan pasporton. ; Povas ĝi protekti homon ; kontraŭ bruta morto.

'178 Homon savos tia ĉi ; letero de protekto. ; Sagokrucano ne kuraĝos ; tiun jam difekti.

'179 Montris vojon Karlo Luco ; kiel deportojn eviti. ; Fridriĥ Born de Ruĝa Kruco ; age lin imitis.

'180 Konstantino Karadja rumano ; Anĝel Sanz-Briz hispano ; Anĝel Rotta de Vatikano ; laboras kun sama plano.

'181 Jeson al kvarcent protekteletoj ; aŭtoritato donas ; kvankam eskapi de danĝeroj ; multaj pli bezonas.

'182 Oficeje stampu paperojn ; kiel vivsavilojn. ; Ruĝakrucajn protekteletojn ; havu multaj miloj.

'183 Al uniformulo ĝi ; imponos per bela stampo. ; Ĉu ĝi vere validas, tion ; kaŝu inter krampoj.

'184 Oni dokumentojn
respektos ; de Ruĝa Kruco
Sveda ; juran bazon ne
suspektos ; kaj arestojn
cedos."

'185 Sagokrucanoj leterojn
grumblas ; de Ruĝa Kruco
Sveda ; sed ne scias ke juro
stumblas ; ilin validaj
kredas.

'186 Karlo Luc, Anĝelo
Rotta ; Konstantino Karadja
; kaj Valdemaro judojn
kvotas ; eviti regon
sovaĝan.

'187 Helpis al Anĥel Ĝorĝo
Perlaska ; post la puĉo dua ;
por ke protekto ne fiasku ;
en batalo brua.

'188 Koncentrejon
Birkenaŭon ; du kaptitoj
fuĝis. ; Ili raporton verkis
baldaŭ ; kies mesaĝo
muĝos.

'189 Ĉasis ilin la nazioj ;
veron por estingi. ; Tamen
hungarajn judajn estrojn; tiu
raporto atingis.

'190 Juda kontraŭstara ligo ;
volis ne paroli ; pri timiga
koleriga ; aŭŝvicprotokolo.
.....

'191 Filip fon Frojdiger
vokas ; "Legu jen raporton!
; Adolf homvaloron mokas ;
puŝas nin en morton.

'192 En la koncentrejo
nazioj ; judojn amase gasas
; milojn mortigas pro nenio
; vivi neniun lasas."

'193 "Montru!" Valdemaro
diris ; "Jen do la fina
flanko. ; Pri la judaj sortoj
ni miris. ; Nun ni scias,
dankon.

'194 Ĉi raporton mi
tradukos ; kaj al reĝo
sendos. ; Gustav estas mia
amiko. ; Ni reagon atendu."
.....

'195 Danielson
ambasadestro ; ne raporton
kredis. ; "Elrigardu tra
fenestro ; maleblas tiel
procedi.

'196 Sesdek mil homojn
jam ; en majo, ne povas
esti. ; Demandu al registaro
tamen ; ĉu oni tion atestis."

.....

'197 Valdemar' al oficiro ;
petas klarigi ombron. ;
"Ĝeneralstabano, ni miras ;
ĉu ne troas ĉi nombro?"

'198 "Okdek mil homojn ili
; jam vagonare forportis. ;
Ĉiusemajne dudek kvar mil
; pli dividas ĉi sorton."

'199 Fine Valdemar'
sukcesas ; sendi la leteron. ;
"Ho, Gustavo, mi promesas
; ke ĝi diras veron.

'200 Hajnriĥ Himler gvidas
en regno ; judan finan
solvon. ; Ili laŭ la granda
desegno ; fariĝos fumo kaj
polvo."

'201 Skribis al Horti Mikloŝ
Gustavo ; Valdemar'
transdonis ; kaj parolis pri
hasto grava ; al ŝtatestro
imponis.

'202 "Horti, deportojn
malpermesu ; el Hungarujo
judajn ; ke amastransportoj
ĉesu ; kaj mortigoj krudaj."

.....

'203 "Bone ke vi al mi
venas ; kun ĉi reĝa mesaĝo:
; Ĝin mi serioze prenas ;
kun registara engaĝo."

'204 Malpermesis registaro
; judojn fortransporti ;
baldaŭ post la Valdemara ;
pledo ĉe Mikloŝ Horti.

'205 Pro la reĝa telegramo ;
de Gustavo Kvina ; ili ne
sendas judojn al flamoj ; en
bruligo fina.

'206 Skribas Valdemar'
leteron ; al Karlo princo. ;
"Moŝto, helpon konsideru ;
kontraŭ ekstermo grinca.

.....

'207 Por la Ruĝakrucaj
pagoj ; ni bezonas monon ;
kaj pro multaj helpaj agoj ;
pliajn kvar personojn."

'208 "Pensas mi, akceptu vi
; nespertan ĉi Raulon. ; Per
vi ambaŭ ja evitos ; multaj
homoj brulon."

'209 Venis Raul Valenberj' ;
ĥaosan Budapeŝton ; kaj
instruis lin Per Anger ; eluzi
konsulveŝton.

'210 Rajtas Raul fari veran ;
ambasadpasporton. ;
Multajn li elskribas, homoj
; do eskapas morton.

'211 Raul' ricevis multan
monon ; de judoj en Usono.
; Kredis rusoj do ke estis ; li
usona spiono.

'212 Valdemaro de Ruĝa
Kruco; neniun monon
ricevis. ; Kunlaborantojn
preskaŭ ducent ; estri sen ĝi
li devis.

'213 Savas Raulo per
pasportoj ; nur ĉasatajn
judojn. ; Valdemaro savas
ĉiajn ; homojn sen
ekskludo.

'214 Kanto pri Valdemar'
kaj Nina ; longe jam
progresas ; jam ni dancis
parton kvinan ; kaj baldaŭ
dancos sesan.

, & Sesa parto. Militfine
(37):

'215 Faris Valdemar' kaj
Nina ; savlaboron sukcesan.
; Jam ni dancis parton
kvinan. ; Venas parto sesa.
.....

'216 En aŭtuno rusa avanco
; Germanujon minacos. ;
Horti finas aliancon ; kaj
proklamas pacon.

'217 Sagokruco puĉon faras
; en la sama tago. ; Nun
neniu rajto staras ; kontraŭ
teruragoj.

'218 Oni malpermesis
judojn ; eliri el la ghetto ;
sed kadavrojn en Danubon ;
ĉiutage ĵetas.

'219 Nina en Monahinejo ;
de la Sankta Koro ; kun
estrino Hildegardo ; nokte
savlaboras.

'220 Malfermiĝas pordo
subite ; "Vivu Salaŝio!" ;
krias deko da plenarmitoj ;
kelkaj en ebrio.

'221 "Ha! Por tiaj paperoj
malbenaj ; tuta jen fabriko. ;
Ni judaĉojn ĉiujn prenas. ;
Vi vin identigu!"

'222 Vipas kaj tablon
pistole martelas ; ili kaj
blasfemas ; monon kaj
ornamaĵojn ŝtelas ;
monaĥinoj tremas.

**'223 Postan tagon ili
revenas ĝenas**

'224 Sagokrucanoj sen
uniformo ; murdas en
amoko. ; Oni ne du noktojn
dormu ; en la sama loko.
.....

'225 Sagokruco
Valdemaron ; al morto
juĝas ; ĉar li vivpereon
baras ; por multaj kiuj
fuĝas.

'226 Sagokruco jam lin
ĉasas ; kun mortiga celo. ;
Valdemar' malsana kuŝas ;
en malvarma kelo.

'227 Flanken la kurtenon
tiras ; bruto plenarmita. ;
Valdemar' rigardas kun ;
indiferento spita.

'228 Bruto lin rigardis zorge
; ĝis el iu angulo ; iu diris
"Estas nur ; malsana
maljunulo."

'229 Estis lia ŝanco bona ;
ke razado mankas. ; Lin
brutulo ne rekonas ; pro la
barbo blanka.

'230 El la kela ĉambro tiu ;
bruto re eliras. ; "Ĉu
Langleon trovis vi?" ;
brutkamarado miras.

'231 "Ne, li ne estas tie" ;
respondis la unua. ; "Ĉu vi
certas? Mi ne kredas!" ;
diris tuj la dua.

'232 Enrigardis ankaŭ la
dua ; zorge Valdemaron ;
sed ne povis identigi ; lin
tiu barbaro.

'233 Enrigardis bruto dua;
por certecon havi. ; "Mi ne
povas lin rekoni ; vi do
tamen pravis."

'234 Tiel sub milita vintra ;
budapeŝta korto ; Valdemar'
saviĝis de ; la sagokruca
morto.

'235 Malkonate li aspektis ;
pro vizaĝo barba. ; Tial ne
kaptiĝis li ; de Morto murde
varba.

'236 Budapeŝton
ĉirkaŭprenis ; soveta sieĝo.
; Anoj sagokrucaj ĉagrenis ;
urbe en la neĝo.

'237 Konkeris Budapeŝton ;
soveta armeo. ;
Pluvivantojn de juda ghetto
; savis de pereo.

'238 Rodja Malinovskij
malferma ; urbo ĝin
deklaris. ; Ĉion ajn soldatoj
rajtas ; sen puno fari.

'239 Nina diris
"Monahinojn ; la soldatoj
perfortos. ; Ruĝakrucajn
vestojn ŝirme ; mi al ili
portos."

'240 Baldaŭ soldatoj rusaj
venis ; tra la doma pordo ;
kaj komencis virinojn ĝeni ;
en minaca ordo.

'241 Al soldatoj Nina kriis ;
ruse per forta voĉo ; "Ĉu vi
helpantojn sindonajn
perfortos? ; Meritas vi
riproĉon!"

'242 Junaj soldatoj al ŝi
respondas ; haltis preskaŭ
plore ; "Estimata patrino, ni
hontas ; nin pardonu
elkore!"

'243 Raul' ne kredis ke
danĝeris ; por li soveta
flanko ; sed ĉe rusoj
malaperis ; kaj mortis en
Lubjanko.

'244 En printempo paco
sonis ; ĉesis jam pafado. ;
Nova registaro ordonis ;
forlasi ambasadon.

'245 Paro Langle' Svedujen
venas ; sen eĉ unu groŝo. ;
Sin vivteni ili penos ; kun
malplena poŝo.

'246 Libron li verkis, Agoj
kaj tagoj ; en Budapeŝto ,
kaj mendis ; helpon per
aŭtora pago ; kaj
Hungarujen sendis.

'247 Ĥaoson en Budapeŝto ;
libre Nina rakontis ; pri
danĝeroj tre honeste ; kiel
homoj volontis.

'248 Oficiala rekono mankis
; por Valdemar' kaj Nina ;
sed honore oni dankis ; ĉi
heroojn fine.

'249 Ricevis de Ruĝa Kruco
medalon ; ordenon de
Norda Stelo ; justuloj inter
la popoloj ; deklaris Israelo.
.....

'250 Se vi povas pli rakonti
; pri Langlea faro ; strofon
verku por tondronta ;
balado Valdemara.

'251 Jen baladon
Valdemaran ; kantis mi kaj
prave ; kaj la lingvon
tuthomaran ; kaj multajn
vivojn li savis.

'252 Nun mi finas la
baladon ; veran
Valdemaran. ; Lian nomon
tenu ĉiam ; en memoro
karan.)

<& Notoj valdemaraj:

'1 En Feroaj Insuloj travivis ĝis
moderna tempo malnova
tradicio ĉendanci baladojn.

'3 Hugenoj estis kalvinistoj,
viktimoj de religiaj masakroj,
kiuj ekde jaro 1685 amase
forlasis Francujon. Cento el ili
alvenis al Svedujo.

'5 Mathilda Söderén (1832–
1904), eldonisto kaj verkisto.

'6 Svede "Södermanland" aŭ
"Sörmland", provinco sveona
sudokcidentaŭ Stokholmo.

'7 Emil Viktor Langlet (1824–
1898), arĥitekto.

'9 Spetebyhall, bieno en
sudermanlanda paroko Lerbo
apud Katrineholm'. Nupto estis
en 1864.

'10 Filip Langlet (1866–1950),
laboris konstruiste ĉe Robert
Nobel dum 1890–1893 kaj
sekretarie ĉe Alfred Nobel
1896-1897 kaj 1899–1937
instruis en Tehnika Altlernejo
de Stokholmo.

'11 Abraham Langlet (1868–
1936), doktoro pri ĥemio,
instruis en Chalmers Tehnika
Altlernejo en Gotenburgo
1896–1933. Grafologo.

'12 Alexander Langlet (1870–
1953), artisto kaj multjara
prezidanto de Gotenburga
Artista Klubo.

'13 Valdemar Georg Langlet
(1872 decembre 17-an –1960
oktobre 16-a), pionira
svedespo kaj ĵurnalisto.

'14 Ludwik Lejzer Zamenhof
(1859-1917) eldonis Unuan
Libron en 1887.

'17 Antonina Ĉajkovska (1872-
1948), pionira rusespo.

'21 Otto Zeidlitz (1860-1943),
svedespa multlingvulo,
pastrigis en 1888.

'22 V. studis en Upsala
universitato dum jaroj 1891-
1894.

'24 Upsala Klubo Esperantista
fondiĝis en 1891.

- '26 Planlingvon Volapük publikigis inventis kaj publikigis germana pastro Johann Martin Schleyer en jaro 1879. ; Klubo germane "Nürnberger Weltsprachenverein" en 1888 forlasis Volapukon por Esperanto.
- '30 Laŭbezone anstataŭu la vorton "baldaŭ" vorto "poste", "tuj" aŭ "nun".
- '32 Ilja Ostrovski (1855–1910+?), kuracisto, anoncis en monata gazeto La Esperantisto en 1895 bonvenigon en sia domo.
- '33 "La Esperantisto", plej unua espa gazeto, eldoniĝis en Nurenbergo, Germanujo, dum jaroj 1889-1895. ; Erik Etzel, kamarado de V. en Upsalo.
- '39 Sinjoro W. Waher scipovis paroli nur estone, ruse kaj espe. Kun li V. unuafoje parolis espe sen alia lingvo ebla.
- '41 Lev Tolstoj (1828-1910), grafo kaj verkisto ; Inter la moskvaj rusespoj kiuj akompanis la svedojn menciigis nomo Puĉkovski.
- '42 Ruse "Vojna i mir", kvar volumoj de Lev Tolstoj 1865–1869 ; "Carstvo Boĵije vntri vas" 1894, malpermesita de la rusa cenzuro.
- '43 Ĉi tiun rezonon de Tolstoj citas V. en "Till häst genom Ryssland" ("Sur ĉevalo tra Rusujo") 1898, sur paĝo 46.
- '47 Antonina rakontis krimeajn popolfabelojn, kiujn V. poste publikigis en sveda gazeto.
- '49 La vaporŝipo nomiĝis Miĥail. ; Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko (1863–1913), instruisto, ĵurnalisto kaj pionira rusespo.
- '50 Nikolao Borovko sendis al Z. leteron en 1895(?) demandante kio kondukis Z.on al esp. La respondo Vladimir Gernet el la rusa tradukis en esperanton kaj publikigis en Lingvo Internacia.
- '51 Tiu voĉdono okazis en 1894.
- '57 Vladimir Gernet (1870–1929), pionira rusespo, ĥemiisto kaj vinberinstitutestro.
- '59 En la dua numero de 1895.
- '65 Du vaporŝipojn ili malektis pro la drinkemo de ties anglaj ŝipestroj. Ili iris per ŝipo Jekaterina II.
- '69 Ahmed paŝao, membro de Grand-sinjora Kortego de la sultano de Otomana Imperio.
- '73 "Lingvo Internacia" eldoniĝis en Upsalo 1895–1899, poste alilande. Unue faris ĝin V., d-ro Krikortz, Paul Nylén (1870-1958) kaj P. Ahlberg.

'81 La dua rusa vojaĝo de V. estis en jaro 1896.

'82 Nina Borovko-Langlet (1896–1988) naskiĝis en aŭgusto baldaŭ post la dua vizito de V.

'84 Aleks laboris por petrolea ekspozicio de Nobel.

'85 Poste Aleks kaj V. kune vojaĝis al Polujo, Hungarujo kaj Italujo.

'86 En Budapeŝto oni festis en jaro 1896 mil jarojn post la "landpreno" de Hungarujo.

'88 Estis en jaro 1897.

'90 Jasnaja Poljana ("Luma Kampo"), vilaĝo 180 kilometrojn sudob Moskvo.

'93 Tiun gravan por li interparolon priskribas V. en sia libro "Till häst genom Ryssland", paĝojn 79–84.

'96 Sergej Aleksandroviĉ, rekta prapranepo de Ŝahin Ĥan Geraj kaj tronheredunto de Tatarujo Krimea.

'97 Dmitri Ivaniĉ, vilaĝa paca juĝisto en Filonovskaja en 1897. ; La atamano, tio estas kozaka estro, nomiĝis Pugaĉev ; Filonovskaja, vilaĝo en Don-kozaka regiono, 680 kilometrojn sudorientob Moskvo.

'99 En Filinovskaja V. loĝis kun la familio de Pavl Stepaniĉ Fokin kaj liaj edzino Marja Varfolomejevna, filino Ŝurenka, fileto Ivan, patrino Olga Markovna, fratino Dunja, bofrato Avrelian kaj ilia dekkvinjara filino Vanda.

'106 Signe Paulina Blomberg (1876-1921), flegistino, filino de Karl Evert Blomberg kaj Paulina Grosskopf, edziniĝis al V. en sia hejmurbo Åbo (suome Turku), Finnlando, tiama Rusujo, en 1899. ; Akvelando (svede Åland, suome Ahvenanmaa), insulara provinco finnlanda kaj svedlingva en Balta Maro.

'108 Oscar Dua (1829–1907), reĝo de Svedujo 1872–1907 kaj de Norvegujo 1872–1905.

'110 Emil Langlet (1900–1966), Lars Langlet (1903–1981).

'112 Svede "Om revolutionsrörelsen i Ryssland" ("Pri la revolucia movado en Rusujo") 1906, pri jaro 1905.

'114 Sveda Esperanto-Federacio fondiĝis en 1906. V. estis ĝia prezidanto ĝis 1909.

'115 Svede "Om kriget på Balkan" ("Pri la milito en Balkano") 1912.

'117 Svede "Frihetskorset av tredje klass", suome "Vapaudenristin ritarikunta", 1918. Finnlando sendependiĝis en 1917.

- '119 V. iris al Moskvo en 1923.
- '123 V. kaj Nina geedziĝis en 1925.
- '128 Laŭ Traktaĵo de Trianono la 4-an de junio 1920 Hungarujo perdis 72 procentojn de sia teritorio kaj 62 procentojn de sia loĝantaro.
- '129 V. rajdis 1500 km-ojn tra Hungarujo en 1931. Svede "Till häst genom Ungern" 1934.
- '131 Ek de 1932 V. instruis la svedan en Pálmány Péter universitato en Budapeŝto.
- '133 V. estis nepagata sveda kultura ataŝeo en Budapeŝto 1938–1944.
- '134 Adolf Hitler (1889–1945), nazia partiestro 1921–1945 kaj diktatoro de Germanujo 1933–1945.
- '136 Arja, el sanskrita vorto por "nobla", nazie signifas ana al la propra (germana) "raso", ĝenerale homo helkolora haŭte, hare kaj okule.
- '138 Svastiko, aŭ hoka kruco, antikva sunsimbolo, uzita por nazia partio.
- '139 Germanujo invadis Polujon en 1939 septembro 1-an.
- '141 Germanujo okupis Aŭstrujon en 1938 marte 12-an.
- '142 Batalo de Stalingrad (antaŭe nomata Caricin, poste Volgograd) daŭris de 1942 aŭguste ĝis 1943 februare.
- '143 Germanoj puĉis Hungarujon 1944 marte 19-an.
- '144 Per Anger (1913–2002), sveda diplomato.
- '145 Adolf Eichmann (1906–1962), alta oficiro de nazia polico Schutzstaffel.
- '152 Carl Lutz (1895–1975), svisa diplomato.
- '157 Hungare "Nyilaskeresztes Párt – Hungarista Mozgalom", hungara nazieska partio dum 1935–1945.
- '167 Folke Bernadotte (1895–1948), sveda princido kaj grafo. Lin murdis israelanoj en Jerusalemo dum lia pacmisio por Unuiĝintaj Nacioj.
- '169 La ĝenerala sekretario de la eksterlanda ministerio nomiĝis Arnóthy-Jungert.
- '179 Friedrich Born (1903–1963), svisa diplomato, delegito de Internacia Komitato de Ruĝa Kruco de majo 1944 ĝis januaro 1945.
- '180 Constantin Karadja (1889–1950) rumana diplomato ; Ángel Sanz-Briz (1910-1980) hispana diplomato ; Angelo Rotta (1872–1965), apostola nuncio.
- '187 Giorgio Perlasca (1910–1992), itala negocisto.

- '188 Vrba-Wetzlerraporto, 1944 aprile, unu el la "Auschwitz-protokoloj", verkita de eskapintoj de Birkenau, nome Walter Rosenberg alias Rudolf Vrba (1924–2006) kaj Alfréd Wetzler (1918-1988).
- '191 Pinchas Freudiger (??–19??), ekleziestro kaj membro de Juda Konsilantaro en Budapeŝto.
- '194 Gustaf Kvina (1858–1950), reĝo de Svedujo 1907–1950.
- '195 Ivan Danielson (1880–1963), sveda diplomato.
- '200 Heinrich Himmler (1900–1945), estro de nazia polico Schutzstaffel dum 1929–1945.
- '201 Horthy Miklós (1868–1957), hungara ŝtatestro dum 1920–1944.
- '206 Prins Carl (1861–1951), reĝido de Svedujo, estro de Sveda Ruĝa Kruco 1906-1945.
- '209 Raoul Wallenberg (1912–1947), sveda diplomato.
- '217 Sagokruca puĉo okazis 1944 oktobre 16-an.
- '220 Ferenc Szálasi (-1946), estro de Sagokruca Partio 1932-1946, mortpunita.
- '226 Ĉi epizodon priskribas Björn Runberg en sia libro "Valdemar Langlet – räddare i faran" ("V. L. – savanto en la danĝero") 2000, paĝon 37.
- '237 Soveta armeo prenis Budapeŝton en 1945 januare 16-an.
- '238 Rodion Malinovskij (1898 – 1967), soveta marŝalo kaj ministro pri defendo 1957-1967.
- '242 Pri ĉi epizodo Nina foje parolis, diris Pieter Langlet kaj Monika Langlet-Forsberg, genepoj de V., en 2015 aprile.
- '243 Lubjanko, malliberejo en Moskvo kaj centro de soveta spiona agentejo NKVD, poste nomata KGB. Supozeble tie en 1947 Raul' mortis.
- '246 Svede "Verk och dagar i Budapest" 1946. La monon pro la libro V. uzis por sendi krizan helpon al Hungarujo.
- '247 Svede "Kaos i Budapest" 1982, espa traduko en 2001.
- '249 Svede "Röda Korsets silvermedalj" 1946 ; "Nordstjerneorden" 1949? ; hebree "Hasid Ummot Ha-'Olam", "Jad Vaŝem" 1965.
- '251 Oni taksas ke la Langlea agado en la militfino savis inter dekmil kaj dudek mil homojn, sed eble pli.
- >

RESTAS POR ENBALADIGI

1886-1890 Gimnazio
1891-94 Upsala universitato
Bajdarskij vorota=pordego al
Jalto.
Kun leŭtenanto dragona
Nehad Bej en Stambul iris al
Aĥmed Paŝa.
1896-1905 Sth Dagblad
Protektaj leteroj hungare kaj
germane,
Maximilian Jaeger (1915-
1999), svisa diplomato.
Lars G:son Berg (1918-1993),
sveda diplomato.
1945-5 Forlasas ambasado
Bp-on
1945 Reiro al Svedujo

Till häst genom Ryssland:

T.h.g.R. 218 Tolstoja libro "Iru
vuj en la lumo"
T.h.g.R. 370 Leonid Afrikaniĉ,
Jelec
T.h.g.R. 380 "Konverto" en
virgulina monaĥnejo en
Moskva
T.h.g.R. 387 al. 3 Kial ni homoj
tiom malofte havas kapablon...
= ALTERNATIVA
REKANTAĴO!
T.h.g.R. 399 helpis al Tolstoj
traduki leteron publikan al
skandinavo
T.h.g.R. 400 libro de Tolstoj
"Kreuzersonaten", "Sveda
insulo" de Lvoviĉ
T.h.g.R. 411 ĉe Sergej Fomitj
en Moskvo


T.h.g.R. 419 lastan tagon en
Novgorodo falis neĝo

Verk och dagar i Budapest:

V.o.d. 37 Post la puĉo, nomoj
kaj agoj
V.o.d. 42 V. kaj Carl Lutz
V. o d. 47 – dialogo
V.o.d. 70 monaĥeja helpo
V.o.d. 79 parolo kun ministro
pri juro
V.o.d. 81 OKW =
Oberkommando der
Wehrmacht
V.o.d. 84-85 kunlaboraj
malfaciloj
V.o.d. 111 Respondo de
Horthy al Gustaf + kelkaj datoj
V.o.d. 112 monsignore
Verolino
V.o.d. 118 perforte
V.o.d. 122 apogite
V.o.d. 125 kisi anĝelon
V.o.d. 129 Eszterházy
mortigis??
V.o.d. 163 neniuj paperoj
bezonataj kun Langlet
V.o.d. 171 L. Berg remas
V.o.d. 183 la rajdo
V.o.d. 194 estro de internacia
ruĝakruca komitato
V.o.d. 197 malavantaĝo de du
ruĝaj krucoj

Hembyggsdföreningens årsbok:

Haltigis vagonaron plenan
survojan al koncentrejo.



©GRIJSD egriseo